



OFICIALA ORGANO DE PROLET-ESPERANTISTA UNIO DE IBER-AMERIKAJ LANDOJ

II. ^a Epoko 4.a (7) Jaro	BULTENO Januaro - Februaro 1938	Redaktejo kaj sidejo: Sección Esp.ta. de A. E. P.: Kropotkine, 30 - Barcelona	Nro. 1 (41)
--	------------------------------------	--	-------------

LA ESCUELA NUEVA Y EL ESPERANTO

En el artículo editorial del último número de nuestro «Proleta Voĉo» tratábamos de la necesidad de introducir el Idioma Internacional Esperanto en la Escuela Nueva. Nosotros, esperantistas obreros, conscientes de la significación cultural y social del idioma común, creemos que su estudio puede aportar verdaderos valores en el desarrollo de la vida nueva que se está forjando en la España que lucha contra el fascismo.

Y ¿por qué comprendemos que es precisamente ahora cuando el idioma de Zamenhof puede dar resultados positivos? ¿En qué fundamentamos nuestro interés para considerar el Esperanto como parte integrante de las tareas docentes de la Escuela Nueva? Veámoslo.

En todos los cambios político-sociales que han ocurrido en la vida de la sociedad humana desde sus principios, vemos que ha sido cambiado el contenido de las correspondientes superestructuras (1), cuya misión era y es la de justificar un sistema de vida y una peculiar manera de pensar que caracteriza una sociedad determinada. La cultura, en tanto que superestructura ideológica, ha sido también transformada según los intereses de clase de quien ha monopolizado el Poder del Estado.

La burguesía, por ejemplo, se ha servido de cuantos medios de propaganda estaban a su alcance; tales como la ESCUELA, la prensa, la radio, el cine, etc. La Escuela era para la burguesía, como lo fué para los regímenes que la precedieron, una de sus más preciadas instituciones. Su escuela, a la que llamamos vieja escuela, intelectualista y verbalista, se opone al concepto de escuela nueva o de trabajo. «Saber es

Poder» era su fórmula. Pero saber en sí, sin embargo, no es poder, únicamente tiene valor cuando posee fuerza impulsiva. Le faltaba vida, acción (2). Estaba orientada en el sentido de dotar al niño solamente de los conocimientos imprescindibles para mejor sacar de él, más tarde, toda su capacidad de trabajo.

Memorística en esencia hacia del niño un ser autómatas, pasivo, ahogando en



ciernes su fuerza intelectual latente y su autodeterminación. Nacionalista en el sentido patriótico de la palabra, inculcábase unos conocimientos que le encerraban geográfica e intelectualmente dentro del marco restringido de la nación. Por su misión no podía inspirar al niño sentimientos humanos hacia los demás países hasta que éste adquiriera una visión amplia del mundo. Ello hubiera significado un obstáculo para utilizar a las masas obreras para sus fines bélicos y de conquista. En la vieja escuela la introducción del Idioma Internacional Esperanto esta-

ba en desacuerdo con la dirección de sus tareas docentes. Más todavía; el idioma universal hubiera inspirado a los educandos influencias de comunidad, y ello no interesaba.

En cambio la Nueva Escuela, al mismo tiempo que unifica el mundo escolar con el mundo social, no puede olvidar que como complemento de la educación internacionalista que da al niño necesita el instrumento que le capacite y faculte para ulteriores relaciones en los múltiples aspectos de la vida. Esto es el IDIOMA AUXILIAR, sin el cual no es posible asimilar lo que prácticamente encierra la idea del internacionalismo.

La nueva educación ha de valerse de los medios indispensables para adaptarse a las necesidades siempre cambiantes de la vida. A este respecto S. Fridman dice: «El proceso educativo, que es una parte de todo el desarrollo científico social, debe ser elevado al máximo; a fin de que la formación de la conducta del hombre se hallen en consonancia con las exigencias impuestas por las particularidades del régimen establecido» (3). Es precisamente en este sentido que la Nueva Escuela orientará su misión haciendo posible esperar y exigir de ella un más eficaz rendimiento. En cuanto a la formación intelectual, debe preparar al niño mediante el cultivo de la capacidad de juzgar, y la aplicación del método científico, dando a nuestra escuela todo el contenido real que las circunstancias nos permitan, ya que representa un período de transición, una ruptura entre un pasado lleno de injusticia y un futuro día-lano, que guía a la nueva generación hacia la sociedad Socialista. Hay en el niño un contenido de educación no orga-

nizada que hemos de adaptar a los conocimientos científicos ya organizados, inclinandole al trabajo para que engendre nuevos valores. Hemos de ayudar al niño a comprender mejor la vida social, en la que él deberá representar su papel, dándole desde la escuela, una visión clara de la sociedad en que vive (4). He aquí porqué el idioma auxiliar internacional Esperanto tiene una misión a cumplir. Su introducción en la Escuela Nueva puede ser de trascendencia para fomentar este espíritu de solidaridad, no ya escolar, sino social, que es parte integrante de nuestras actuales tareas docentes. El Esperanto, además, es un «centro de interés» adonde se orientarían las ansias de saber; y conocer qué es lo que pasa más allá del mundo escolar y del límite geográfico de nuestro país.

Tenemos la responsabilidad de trabajar para que la generación que se forma, en posesión completa del Esperanto, haga posible la tan soñada confraternización universal a la que todos los esperantistas obreros hemos dedicado nuestras mejores energías y esperanzas.

Los trabajadores de la Enseñanza deben percatarse bien del valor pedagógico que representa el idioma común para que, con su ayuda, fomentemos una moral y una psicología de acuerdo con las corrientes internacionalistas de nuestro tiempo.

F. S. MARTI

(1) Las superestructuras son las instituciones o elementos político-sociales que dependen directa o indirectamente del grado de desenvolvimiento alcanzado por las fuerzas de producción social, esto es, del carácter clasista de la sociedad. *El Materialismo Histórico*. N. Bujarin — Edit. Cencil — Madrid 1933.

(2) *El tesoro del Maestro*. Edit. Labor — Barc. 1937.

(3) *Problemas de Pedagogía Marxista*. Edit. Aguilar — Madrid 1933.

(4) *Aplicación del Método Decroly*. Gerardo Boon. Edit. Bertrán — Madrid 1932.

EL LA REDAKCIO

Kdo. Ramón Arquer, membro de Ateneo Enciclopédico Popular, simpatianto je Esperanto, sendis de Aragona Fronto 50 ptojn. por helpi la kulturajn taskojn de P. U. I. L. Ni tre dankas lian sindonemon por la prolet-esperantista movado.

Ĉe la Sociala Studa Fako de la Federacio de Lernantoj kaj Ekslernantoj de Barcelona Labora Lernejo (FAEET), aro da konsciaj esperantistoj fondis esperantan subsekcion. Ĝia celo, kiel tiu de ĉiuj klasaj esp-organizaĵoj, estas propagandi, per efikaj kursoj, la internacian lingvon.

Estas necese ke tiuj, kiuj publikas ĉiasepacajn esperantaĵojn bonvolu sendi ilin al menciita fako.

Ni esperas ke la laboro de la esperantistoj de Barcelona Labora Lernejo estu fruktodona, ĉar tiuj pioniroj hodiaŭaj estos plejkredeble la esperantistoj de la morgaŭo, kiuj finsukcesigos Esperanton.

GRAMATIKAJ TEMOJ

LA MONDO

La intersekva evoluo de Esperanto postulas de ni la diskonigon de la ĉiutagaj studoj, kiujn oni faras por ĝin plibonigi. Por esti bonaj esperantistoj estas necese koni bone nian internacian lingvon, tial ni dediĉas la jenan studon al la esperanta gelernantaro, por ke ili eltiru, kiel eble plej trafe, la bezonatajn konojn por la tuja kompreno kaj enpenetro de Esperanto. — *Red.*

El lingvo elementoj oni distingas en Esperanto radikojn, afiksojn kaj finaĵojn.

Ĉar nia studo rilatas nur al afiksoj, ni diru ke afiksoj estas silaboj, kiuj nuanças aŭ modifas la sencon de la radiko al kiu

ili gluiĝas; sed influas nek ĝian gramatikan karakteron, nek ĝian vortkonstruan funkcion. Dum la radikoj ligiĝas inter si laŭ certaj vortkunmetaj reguloj, pri la afiksoj ne validas reguloj ĝeneralaj.

Gravan signifon havas la frazelementoj: Afiksoj, en lingvo Esperanto. Sen ili internacia lingvo estus esprimmalriĉa kaj oni povus trafe diri ke ĝi jam estus fiaskinta de antaŭ longe. La afiksoj estas tio, kio donas specialan karakteron al ĝi. Tre certe la elparola flueco estas konsekvenco rekta de la valoro de la afiksoj.

Tial ke ni komprenas tiel la rolon de tiuj valoraj frazelementoj, ni volas oferi al legantoj de "Proleta Voĉo" sciencan studon pri ĝiaj ecoj kaj aplikoj.

SUFIKSOIDOJ (1)

Sufiksoidoj ni nomas tiun parton de la sufiksoj, kiuj propre ne estas sufiksoj, ĉar ili funkcias preskaŭ tute same kiel la radikoj. Tio estas:

Ili povas esti uzataj memstare, kun finaĵo, samkiel la radikoj (aĵo, ero, ino, ilo, igi, iĝi, ema, inda, ktp.). Inter radiko kaj sufiksoido ne ekzistas esenca diferenco.

La memstara vorto (radiko) en Esperanto respondas al nacilingva memstara vorto, dum la signifo kaj efiko de afikso ne estas interpreteblaj per nacilingva vorto, oni devas ĝin klarigi per ekzemploj. Oni povus fari inter radikoj kaj sufiksoidoj tiun distingon ke la sufiksoidoj ofte ricevas senco pli strikte limitan, ol ilia vera signifo. Ekz.: *paŭlo* ne estas ĉia pafinstrumento, sed unu certa el ili; *homaro*

ne estas simple aro da homoj, sed ĉiuj homoj de la mondo. Tamen ĉiun ĉi senco la element-komplekso ja entenas, ili nur estas strikligitaj aŭ ĝeneraligitaj. Cetere la evoluo de la lingvo iom post iom anstataŭigas tiajn formojn per radikoj. Tiel aperis ekz.: *fusilo* (paŭlo), *ŝpato* kaj *pioĉo* (fosilo), ktp. Kompreneble estas necese anstataŭigi ĉiujn tiajn formojn (ekz.: *flugilo*, *homaro*, *ŝlosilo*), eĉ se por ili ekzistas apartaj radikoj en la naciaj lingvoj. Multaj formoj konservos ĉiam sian pli striktan aŭ pli ĝeneralan senco, kaj por alia senco oni uzos aliajn formojn (*Augmaŝino*, aro da homoj, *homamaso*, *losaparato*).

La sufiksoidojn ni pritraktos laŭ jena ordo:

TABELO PRI SUFIKSOIDAJ KATEGORIOJ		
SUBSTANTIVAJ	ADJEKTIVAJ	VERBAJ
AĴO	EBLA	IGI
ANO	EMA	IĜI
ARO	INDA	ADI
ECO		
EJO	Neoficialaj	Neoficiala
ERO	ENDA	IZI
ESTRO	ESKA	—
IDO	IVA	—
ILO	OIDA	—
INGO	OZA	—
INO		
ISMO		
ISTO		
IUJO		
ULO		
	VERAJ SUFIKSOJ	
Neoficialaj	AĈA	IFI
IO	EGA	Neoficiala
IKO	ETA	ĈJ-NJ
ITO	UM	—

(1) La vorto Sufiksoido konsistas el: sufiks- (radiko) + -oida (sufikso). Oida estas vorto neoficiala, sed uzata ekskluzive en la teknika lingvo. Signifo: forma. Ekz.: arboida, ĥoroïda.

DE L' AFIKSOJ

AJO

Ajo estas: io konkreta, sensebla.

Kun tiu ĉi senco ĝi funkcias en siaj kunmetoj, kiel substantivradika sufikso, ĝi postulas antaŭ si ĉiam substantivan flankelementon. Plej ofte ĝi ligiĝas al adjektivaj kaj verbaj radikoj. Ekz.: *bel-ajo*, *utilaĵo*, *dolĉaĵo*, *molaĵo*, *necesaĵo*, *bindaĵo*, *kreskaĵo*, *amuzajo*, *finajo*, ktp.

Memstare ĝia senco estas: io konkreta, sensebla (objekto, afero) kun forta nuanco de nedifiniteco.

ANO

Ano signifas: apartenulo. Ĝia senco en siaj kunmetoj povas esti:

a) Membro: Ekz.: *klubano*, *komitatano*, *akademiano*.

b) Loĝanto: Ekz.: *landano*, *urbano*, *vilaĝano*, ktp.

c) Adepto, disĉiplo: Ekz.: *gimnaziano*, *luterano*.

d) Simpla apartenulo: Ekz.: *ŝipano*, *familiano*, *ŝtatano*.

Memstare ĝia signifo estas membro, ano de klubo, societo, komitato, akademio.

ARO

Aro signifas: kolekto da. Kvankam se neologike ĝi havas ĉiam pluraligan efikon.

En siaj kunmetoj ĝi povas signifi:

a) Ĉiujn en la mondo el la respektiva speco (ĉiom da): ekz.: *homaro*, *birdaro*, *kreskajaro*, *gazetaro*.

b) Liston, kolekton en libro: ekz.: *nomaro*, *vortaro*, *frazaro*, *prezaro*.

c) Grupon: ekz.: *brutaro*, *ĉevalaro*, *bovaro*.

d) Simple la pluralon: ekz.: *sentaro* (sentoj), *akvaro* (akvoj).

Memstare ĝia signifo estas: grupo, trupo, grego; ekz.: *aro da homoj* (distingu de homaro!), *aro da bestoj*, *arboj*, *birdoj*.

ECO

Eco havas la signifon: kvalito.

Laŭ la principo de sufiko oni povas multfoje ellasi la sufikson *eco* antaŭ adjektivaj radikoj; ĉar abstrakto kaj kvalito estas konceptoj tiel parencaj, ke ilia intermikso preskaŭ ne estigas konfuzon.

Ekz.: La "bono de la patro" estas samsignifa al la "boneco de la patro". La tradicio lingva, tamen, ankoraŭ insistas pri ecoformoj. Male estas evitinde uzi la ecoformojn, kiam temas ne pri ies kvalito, sed pri abstrakta koncepto. Ekzemple oni povas diri "mi ĝojas pri la proksimeco de via loĝejo; la alteco de tiu muro; la noveco de la vesto; antikveco de la libro" ĉar tie-ĉi temas pri kvalito. Sed oni diru: li estas en la proksimo; la birdo flugis al la alto; li amas la novon, en la antikvo, ktp., ĉar ĉi-tie temas pri abstraktaĵoj. Same malĝusta estas la vorto *eblecoj*; devas esti *ebloj* aŭ *eblaĵoj*. Oni ne diru li faris al mi *atablecon*, sed, li faris al mi *afablaĵojn*. *Malsano* estas la abstrakta koncepto mem: "lia *malsano* pligraviĝis".

EJO

Ejo signifas: loko. Ĝi povas esti uzata:

a) Post substantivaj radikoj: ekz.: *trezor-ejo*, *poŝtejo*.

b) Post verbaj radikoj: ekz.: *forĝejo*, *gardejo*, *presejo*, *promenejo*, *vendejo*, *renkontejo*.

c) Post adjektivaj radikoj: *ejo* funkcias substantivige: ekz.: *malliberejo*, t. e. *ejo de mallibero*; *vastejo*.

Memstare ĝia signifo estas loko.

ERO

Ero signifas: Plej malgranda parto, elemento, atomo. Ekz.: *Monero*, *panero*, *pajlero*, *sablero*, *larmero*. Ankaŭ oni povas diri: *ero* el ŝtalo, t. e. uzante la sufikson kiel radikon.

Ne substantivajn flankelementojn ĝi substantivigas per sia vortefiko. Ekz.: *kudrero* (ero de kudr(aj)o); *pensero*.

ESTRO

Estro signifas: Gvidanto, komandanto, ordonanto, direktanto, mastro, ĉefo.

Ekz.: *ŝipestro*, *ofcestro*, *poŝtestro*, *fakultatestro* (dekano).

Inter -estro kaj ĉef- ekzistas tiu diferenco, ke *estro* signifas gvidanton, dum *ĉef-* signifas la plej rangi, povan, grandan inter similaj (ĉef-ministro, ĉefartikolo).

IDO

Ido signifas:

a) Filo de: ekz.: *regido*, *princido* (titoloj).

b) Juna naskito de: ekz.: *ĉevalido*, *birdido*, *hundo*.

c) Salo de halogena acido (hemio): ekz.: *Bromido*, *klorido*, *fluorido*.

Ido estas krome la nomo de misreformita Esperanto.

ILO

Ilo signifas plej ĝenerale: io, per kio oni plenumas agon, io por fari de io. Do: instrumento, aparato, rimedo, ktp.

Post verbaj radikoj ĝi signifas:

a) Ilo de... *ŝlosilo*, *kovrilo*, *levilo*, *montrilo*, *portilo*, *paŝilo*, ktp.

b) Rimedo, procedo de. Ekz.: *solvilo* de problemo, *abonilo*, *voĉdonilo*, *propagandilo*.

Post verbaj radikoj ĝi signifas ĉiam farilo de. Ekz.: *rektilo*, *fajrilo*, *linilo*, *kovrilo*, *sanilo*.

Dadrigola en la sekvonta numero

Kompilis: SURIŬACH

El Gramatiko de Kalocsaj - Waringhien

SCIIGO

La proletaj esperantistaj organizoj en Barcelono, ILES k PUIL, publike deklaras ke ili, samkiel la ceteraj proletaj organizoj, antaŭ ol tri monatoj retiriĝis el la kontraŭfaŝista Esperantista Komitato en Barcelono.

ILES k PUIL komunikas tion por eviti konfuzon k eventualan miskomprenon tiurilatan.

ALVOKO ANTAŬ DANĜERO DE TUTMONDA MILITO

Prolet-esperantistaj nederlandanoj zorgu atenteme!!...

Lastatempe, ni konstatas en la enlanda kaj eksterlanda presaroj la oftan aperon de l' nomo de tiu pacema lando, kiu kuŝas ĉirkaŭita de l' Norda Maro, Belgio kaj Germanio, t. e. Nederlando. Tiu fakto nenion gravan entenus se ĝi ne rilatus je l' ĉiutage pligrandiĝanta danĝero de tutmonda milito.

Acro ŝargita el tiu danĝero blovas de Oriento al Okcidento, kaj, konsekvence, de Germanio al Holando. La persista blovado de tiu vento infektitis, laŭŝajne, la holandan registaron, kiu lastatempe deflankiĝis al faŝismo, sen konsiliĝi kun la tuta popolo. Ĉu la popola volo nenion valoras por tiuj "sinjoroj", kiuj regas tiun nordan landon, aŭ ili jam propravole ekagas, laŭ la nazista sistemo de ĝia najbara lando Germanio?

La nunaj momentoj estas gravaj, nederlandaj kamaradoj, kaj via najbareco kun Germanio ankaŭ. Vi devas zorgi atenteme ĉiujn movojn de l' faŝista kapitalismo internacia. Ĝi agadas diplomate, t. e. kaŝe, senskrupule, subtere, preparante novan militon, per kiu, ĝi intencus doni laboron (?) al senlaborularo el ĉiu lando, kaj, samtempe, ĝi forigus la malmultajn avantaĝojn atingitaj de l' proletaro dum multjara klasbatalado.

Tian alvokon faras al vi, al nederlandanoj ĝenerale, la hispanaj laboristoj, tiuj, kiuj jam de post unu jaro kaj duono sentas sur iliaj propraj korpoj, sur la korpoj de iliaj plej karaj amikoj kaj familianoj la kruelajn ungegojn sangozajn de l' faŝismo internacia.

Sed tian alvokon faras, precipe al la proletesperantistaro nederlanda, la barcelonaj proletesperantistoj, la P. U. I. L. -anoj, kiuj, de antaŭ longe, tiel kore kaj amike interrilatas kun vi pere de l' esperanta korespondado.

Imagu, nur unu momento, la teruran bildon produktita de batalo inter faŝistaj fortoj militaj, ĉu aeraj, ĉu maraj, ĉu teraj, kaj aliaj similaj kontraŭ-faŝistaj, kaj ke vi, devige envicigitaj en la unuaj, akre luktadus kontraŭ la duaj, en kiuj volonte estus ni. Kompreneble, tio similas malagrablan sonĝon, sed ĝi povas fariĝi realecon se ĉiuj ni forlasus aŭ ne priatentus sufiĉe lerte tiun danĝeron, al kiu volas puŝi nin la plutokratiaj kaj aŭtokratiaj registaroj.

Nia alvoko estu atingebla, do, je ĉiuj landoj, kiuj ankaŭ staras antaŭ la sama danĝero ol Holando, kaj ni, proletesperantistoj el la tuta mondo, estu la nelacigeblaj pioniroj en la laboro diskonadi ĉien tiun danĝeron pere de esperantaj artikoloj kaj tradukoj al naciaj lingvoj.

Tiamaniere, ni preparos la grudon, kaplablante niajn klasfratojn, kaj, kiam la okazo alvenu, ni sciu transformigi la kapitalisman militon je tutmonda revolucio socia kaj starigi ĉie solidajn bazojn de nova vivo en kiu nur estu eblaj LIBERO kaj PROGRESO.

ABLASOF

La jarkotizo de PUIL estas tri pesetoj jare plus unu peseto por la membrokartoj.

Se nia oficiala organo ne aperas regule ne plendu ge-kdoj. Pli-bone ol plendi estas sendi, pere de la delegito de via grupo aŭ private, la kotizon de l'jaro 1938. ESTU RESPONDECAJ PRI VIAJ AGOJ!



Camarada P. U. I. L. - anol Nuestra organización esperantista no recibe subvención alguna. Sólo vive de la ayuda moral y material de sus componentes. ENVÍA TU COTIZACIÓN ANUAL!

La sociaj problemoj k la rolo de Esperanto

I

Antaŭ la konscio de ĉiu esperantista laboristo prezentigas hodiaŭ multaj demandoj k diversaj hezitoj. Estas elementala devo de ĉiu la studo k kompreno de tiuj problemoj, kiuj nuntempe svarmas en nia socio.

Post kiam nia movado ĝenerale fariĝis 50-jara, ni konstatas ĝian situacion k agnoskas ke ĝi estas ankoraŭ en embrio, tute same kiel koncerne ĉiuj demandoj raciigi socion. Kiel faktoro de progreso k kiel ilo esperanto fortege ligiĝas al la sorto de ĉiuj progresemaj revoj de la homaro, efektive en evidenta krizo materiala k morala, pro la aktuala stato de l'socio.

Nur per la klara kompreno de tiu intima miksiĝo kun la ĉiepokaj problemoj ni povos ĝuste agi k boncele k efike direkti nin tra l'diversaj vojoj, kiuj kondukas nin al ebligo de pliperfekto k racio rilate la starigo de pozitiva vivĝuo k bonstato. Ja tiuj celoj movigas nin ĉiujn k pro tio ni estas atakataj kiel ĉiu ajn transformiga faktoro en la vojo trafi atingon de pli justa hominterrilatigo, laŭ ĉiuj vidpunktoj. Jen kial ni bezonas lukti, konsciante samtempe kion oni akcelas k kion oni volas atingi.

Estas tute superflue aldoni ke en tiu aspekto ni opinias pri esperanto, ke ĝi signifas tiurilate por ni, klaskonsciaj laboristoj, aplikenda aparato kiun ni devas meti je la servo k utilo helpi diversforme la ĝeneralajn socidemandojn, kiuj nin ĉirkaŭas. Ĉu esperanto povus iam kreski k evolui en ĝia pozitiva aspekto en nia burĝmensa socio? Ĉu esperanto ne estis k estas utiligata de ĉiu por siaj apartaj celoj, kiuj ofte signifas la malon koncerne ĝian animon k progresemon? Ĉu ĝi ne estas aplikata por propagandi faŝismon, ekzemple en Italio; k dum la pasinta milito de 1914-18, la imperialistoj uzis ĝin por ilia ŝovinista propagando?

Memkompreneble do jen kial ni forjetas la neŭtralismon, k aplikas konscie la internacian lingvon kiel mirindan ilon en la valora servo kontribui solvi la sociajn problemojn: la kerno de ĉio.

Konsiderante tial la specifan rolon de nia lingvo k ties karakteriza signifo ĉe la organizoj de laboristaj esperantistoj k ĝia fundamenta kunligeco kun disvolviĝo de socia emancipiĝo, estas ja devo de ĉiu konsciulo en nia movado trastudi k ĝuste kompreni la koncernajn problemojn.

Nur tiel ni plenumos la postulojn, kiuj estas metataj antaŭ ni por helpi k partopreni en la tiom necesa kreskiĝo de niaj

laboristaj organizoj, tiamaniere akcelante la kompletan solvon de ĉiuj demandoj pri socio, kiam ni vere povu taksi pli feliĉan, pli justan k pli kvilibran.

Priatentante do la gravan taskon de la internacia lingvo pere de ĝiaj organizoj taŭgaj por lukti favore al socia etika solvo, nia tasko, sekve, estas komprenigi al ĉiuj laboristoj la utilon de nia laboro k penado, orientigi plej trafe niajn kamaradojn k decide k inteligente polemiki pri la plej strategiaj k konvenaj taktikoj survoje al plifortigo k starigo de rimedoj ebligantaj socialistan sukceson.

Precipe nun, kiam en nia lando ŝtormo furiozas, k ĝi montras okulfrape la pozitivan kernon de ĉiuj sociaj kontraŭstarantaj fortoj, nia tasko estas despli necesa, despli grava k despli efika.

Ne temas pri bagatelaĵoj, temas pri decidaj eventoj, kio nun okazas en Iberio. K nature, la studo de nia lukto k situacio (flanke de nur ĉiuj, kiuj povas savi nin, sin mem savante: t.e. la internacia laboristaro) fariĝas interesenda afero; ĉar ĝi signifas ja unu pluan paŝon en la dornoplena vojo de l'socia emancipiĝo.

K ĉar la laborista esperantista movado fakte nur estas parto de tiu forto akcelanta socialismon, jen kial ĝia tasko estas nepre apud la deziro atingi tiun liberigan celon. Superflue estas diri ke neniam povos vere kreski k utili nia internacia interkomprenigilo sen solvo de ĉiuj sociaj paradoksoj k malfacilaĵoj. Ni senhezite povas atesti pri esperanto kion Rosa Luksemburg opiniis pri libero: "Ne ekzistas socialismo sen socialismo k ne ekzistas socialismo sen libero."

Dum tiuj tiel imponaj momentoj por la sorto de l'savo de civilizo, niaj klopodoj ĝin konservi k evoluigi laŭ postulas la racio estu nia gvidlinio en ĉiu nia ago k en ĉiu nia konscia pripensado.

Neapartigeble de tiuj deziroj por atingi tiom justajn k liberigajn faktojn, ni konsciu grave pri la influo k intereso kiujn havas la tekniko k la mondekonomio en la ĉiutaga evoluo k situacio de la interhomara interrilato. Neniel valoras forte akceli socian renverson sen nepra agnosko de la ekonomiaj faktoj kiuj tiom influas en la sociaj problemoj. Jen kial Ĉinio estas sub la volo de Japanio, Anglio k Usono. K frape lumigas nian menson tiurilate la Etiopia milito, skandalajo kiu nudigis la veron de l'nia eŭropa diplomataro. Aldone, oni memoru ankaŭ la hontigan milito-aventuron de l'ĉako, kiu riĉigis la militindustriistojn k ĉio temis nur pri kverelo

inter diversaj petroĵfirmoj. Nenia eltrovaĵo same estas diri ke Italio ne havas sufiĉan petrolon por ĝiaj "jan nuntempaj militaj bezonoj", cetere liverata de tiuj "demokrataj" landoj, "amikoj" de Hispanio. K pri Svedio? Dum la laboristoj, la popolo, helpas notinde nin per ĉiuj eblaj rimedoj, ĝi eksportas al Germanio de kiam Hitler estras la landon, ekzemple, 25 milionojn de tunoj da fermineralo, kun la fakto ke la eksportado dum tiuj pasintaj monatoj de 1937, preskaŭ duobliĝas kompare kun tiu de 1936; k konsiderante ke Germanio estas unuavica kliento de Svedio, oni povas aserti ke sufiĉe por tiu "ĉantaĝo" al nia milito, la popolo povas "demokrate k libere" vivi. K nenion ni diru pri Anglio, kies riĉo k kvieto, inkluzive tiu "relativa" el ĝia laboristaro, plene dependas de l'eksploatado ĉe Hindio, Sudafriko, Ĉinio, k.c.l

Pli multe ni bezonus diri, eĉ pli statistike, sed mankas ja spacon al ni. Tamen, ni ne ellasu la fakton pri la sinteno de Anglio, Usono, k.c. rilate la ĉina-japana milito. Kvankam tiu milito daŭras de antaŭ malpli da tempo ol la nia, tamen la "demokrataj" landoj kampanjas unuanime per bojkotado k per antijapana agitado, helpe al la "malfeliĉa" Ĉinio. Ni forte simpatias k ŝatas tian agitadon, sed oni devas konsideri la kernon de tio. La financaj investoj de tiuj landoj estas tiom gravaj en Ĉinio ke nur la savon de tiuj fakte ili celas, sub la masko helpi la "malfeliĉan" Ĉinio. Krome, en Ĉinio ne estas forta danĝero pri kontraŭstaro al kia ajn imperialismo. Male, en Hispanio, kvankam ekzistas tiaj financaj interesoj mem, tiuj povas neniel kompariĝi kun tiuj de Ĉinio, k "ĉefe" en Hispanio oni pli timas la karakteron de nia lukto ol la faŝismon mem.

Jen kial la problemoj de socia solvo koncernas la tutan mondon ĝenerale. Jen la pravigo do de komuna agado kontraŭ-kapitalismo. Jes, kontraŭ la kapitalismo, kies internacieco rilate ĝiaj trajtoj estas tiel evidenta, nur unu rimedo: la laboristaro, kies sama internacieco postulas al ĝi konscii pri tio, k enkonduki ĉiujn al kompakta lukto same internacia. Nur en tio kuŝas nia efika laboro k venko.

En tiu aspekto, ankaŭ, devas kunlabori la laborista esperantistaro. Per ĝiaj valoraj elementoj, per ĝiaj organizoj, ĝi povas k devas klopodi plejeble interrilatigi ĉiujn mediojn k sektorojn en la nobla k liberiga tasko: atingi pli socian kvilibron.

En sekvonta artikolo, ni skizos kiajn taskojn k eblojn havas nia specifa movado en la laborista kampo k ĝiaj koncernaj problemoj.

Viktor OSBANTO